

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 28 : Julio – Aŭgusto – Septembro 1994

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

La Kolokvo : genezo kaj estonteco.

Antaŭ jaroj mi karesis la ideon krei kolokvon, kiu kunvenigus Akademianojn kaj aliajn eminentulojn. Ili renkontiĝus en ĉiu tria aŭ kvara jaro por interŝanĝi ideojn pri la lingvo de Zamenhof, ties atingoj kaj ties movado. La ideo firmiĝis. Ĝi estus kolokvo destinita al la bilancado de la atingajoj de la tuta movado kaj de ties perspektivo. Estis tamen malfacile varbi por la realigo de tia ideo! Iuj ne sentis la bezonon sin ĝeni kun tia klopodo. Aliaj komprenis ties utilon por la movado ĝenerale kaj por la Akademio apartel! Sed ĉiu estis legitime okupita pro sia kariero aŭ pro siaj esperantistaj entreprenoj!

Finfine mi sukcesis konvinki kelkajn amikojn, kiuj promesis helpon. Okaze de la jarkunveno de la *Amikoj de l' Akademio* en Parizo (28-an de Majo 1992) mi povis do ne nur fiksi la lastajn detalojn por la eldono de la *AKTOJ, III*, sed ankaŭ prezenti mian projekton de Kolokvo, kiu povus disvolviĝi en la somero 1994. Ĝi aperus "ĉe la centa datreveno de la eldono de *Hamleto* en la traduko de Zamenhof; dato memorinda, ĉar eblas ĝin konsideri kiel la dato, kiam nia lingvo asertis sin kultur-lingvon.

Ĝuste tiun aspekton la kolokvo havos kiel ĉefan taskon demonstri laŭ ĉiuj ĝiaj eblaj facetoj. Ĝi demonstros ĝin ankaŭ praktike per diversaj kultur-vesperoj. Ĝi ankaŭ estos okazo por la motoroj de nia movado montri kiel ili vidas kaj pripensas la venontan disvolviĝo-vojon por nia lingvo kaj nia movado. Ĝi estos momento, kiam ĉiuj partoprenantoj retrovos novajn fortojn kaj esperojn por pace sed decideme alfronti la indiferentan mondon". (La Letero, n-ro 19, p. 1)

En la sama numero (Junio 1992) mi do aperigis la unuan skizon de la "Kolokvo pri la Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto". Laŭ la projekto la diversaj prelegoj apartenu al unu el sep Sekcioj : *Esperanto kiel – lingvo, kultur-portanto, lernobjekto, scienca objekto; Esperanto en la praktiko, en la okuloj de la aliaj, en informado.*

Necesis elekti lokon : ni decidis, ke informiĝinte dum tuta jaro, ni plej malfrue decidus pri la loko la 7-an de Februaro 1993, kiam mi venos Parizon por prelegi ĉe Centro Pompidou antaŭ niaj SAT-amikoj. En tiu informiĝado helpis pluraj amikoj, inter kiuj Kolego Haupenthal okupas aparte meritan lokon.

Tiam efektive ni decidis laŭ la bona konsilo de Jean Thierry, ke la Kolokvo okazos apud Prago dank'al la sperta helpo de D-ro Petr Chrdle kaj de lia profesia organizo *Kava Pech!*

En *La Letero* (n-ro 25, p. 3-4) aperas konkretajn informojn pri la Kolokvo. Ĝi okazos de la 7-a ĝis la 14-a de Julio 1994.

La Kolokvo okazis. Ĝi estis agrabla kaj utila sperto por siaj 30 partoprenantoj. Bedaŭrinde ĝi ne plenumis ĉiujn esperojn de la projektinto, kiu cetere estis perfidita de sia sano kaj ne povis veni. Sed amiko Chrdle estis kaj restis solida. La Kolokvo ŝuldas al li multon. Ĝi lasos memoraĵon al siaj partoprenintoj dank'al broŝuro kuniganta la prelegojn; tiu eldonaĵo ankaŭ estos aĉetebla.

Sed jen la plej grava : la ideo pri la Kolokvo estis lanĉita. Ĝi plaĉis. Eblos al la estonta Estraro de la Akademio renovigi tiun sperton en ekzemple ĉiu tria jaro. Ni almenaŭ ĝojas, ke ni donis al la Akademio plian rimedon por aŭdigi sian voĉon serve al la tuta movado!

D-ro André ALBAULT



NUNTEMPA . . . KRONIKO

**La disvolviĝo de la Unua Kolokvo
de l'Akademio en Prago . . .
bone aŭguras la eventualajn de la estonteco . . .**

*

Fine de Aŭgusto 1994 estis adresita al la sekretario de la Akademio la jena poŝtkarta mesaĝo de longsperta kaj klera samideano el Prago :

"Estimata s-ro sekretario,

Mi aŭdigas min nur por elmontri, ke mi vere ĝuis la Kolokvon de la Akademio en Prago, ĝian inteligentan nivelon. Jes, mi sentis, je la 1-a fojo en mia historio, troviĝi en vera Esperantujo . . . eĉ ia nostalgio aperetas . . .

Kun salutoj,

Jaroslav Mařík."

Jen ĝentile emocia atesto pri la utila efiko de tiaj kunsidoj de la Akademio : kio meritas esti diskonigita al ĉiuj gelegantoj de "La Letero".

Certe la publika semajna kolokvo indus je ankoraŭ pli ampleksa ĉeestantaro de gesamideanoj kaj akademiaj gekolegoj . . . Sed tio estis unua provo, kaj ĝuste ĉi tiu unua provo multe promesas por la estonteco . . .

Unu fojon pli tio montras, ke la Akademio neniel "laboras en . . . kaŝejo", kiel estis antaŭ kelkaj jaroj disklaĉite de disdialektiĝanto! Tio montras ankaŭ kiom prava estas ĉi tiu iniciato de la Akademia Prezidanto, d-ro André Albault : ĝi ja indikas pravan vojon por la estonteco . . .

Ĉiuj, kiuj ne povis ĉeesti la unuan kolokvon, konsolu sin per la penso, ke laŭ ĉia versaĵo okazos pliaj aliaj . . . *)

Nu koran dankon al nia samideano Jaroslav Mařík pro lia aktiva partopreno kaj spontana atesto!

J.T.

*) Baldaŭ aperos la tekstoj de la diversaj kontribuajoj, eldonitaj de Peter Chrdle, sekretario de la AdE-kolokvo (Anglická 878, CZ 25229 Dobřichovice.)

Aktoj de la AdE-Kolokvo pri

la Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto

(Prago, 7 / 14 Julio 1994)

La Aktoj entenos ĉiujn prelegojn eldiritajn dum la Kolokvo, plus la prelego-serio de la iniciatinta Prezidanto, kiu ne povis ĉeesti.

Jen la principa listo de tiuj prelegoj :

- Albault, André (Francio) : *La du ĉefaj grafemo-fonemikaj zonoj (Kiel prononci fremdajn nomojn en Esperanto-tekstoj).*
- Bartovská, Marie (Ĉeĥa Respubliko) : *Teksumo kaj Esperanto.*
- Blanke, Detlev (Germanio) : *La "konkurantoj" de Esperanto; La "Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana" de Eugen Wüster.*
- Bormann, Werner (Germanio) : *Defio faklingvo.*
- Chrdle, Petr (Ĉeĥa Respubliko) : *Bonaj kaj malbonaj spertoj de profesia uzo de Esperanto.*
- Chrdle, Petr (Ĉeĥa Respubliko) : *Specifaj trajtoj de sciencaj kaj teknikaj verkoj en Esperanto.*
- De Smet, Wim (Belgio) : *Pri la "Nova Biologia Nomenklatur" (NBN).*
- Duc Goninaz, Michel (Francio) : *Pri la reguleco de Esperanto.*
- Eichholz, Rüdiger (Kanado) : *Principoj por selekto de fakaj terminoj.*
- Jackson, Ian (Granda-Britujo) : *Fakaj terminoj en la ĉiutaga vivo.*
- Jackson Judith (Germanio / Granda-Britujo) : *Bestoj en la taksonomia ĝangalo – zoologia terminkreado.*
- Kiselman, Christer (Svedio) : *Transitiveco de la verboj en Esperanto.*
- Krejčí-Lewanderska, Alicja (Pollando) : *Sociaj taskoj de la lingvo Esperanto – Unu el la temoj de diskuto pri la estonto kaj estonteco de la internacia lingvo.*
- Simon, Karl-Herman; Ullrich, Ingwart; Weckwerth, Horst (Germanio) : *"Lexicon silvestre" (Ls) - novspeca eldono en la forstfaka literaturo.*
- Thierry, Jean (Francio) : *Raymond Schwartz (1894-1973), la vort-jonglisto.*

*La Aktoj estos eldonitaj de Petr Chrdle en Prago verŝajne antaŭ la jarfino.
Petr Chrdle, Anglická 878, CZ 252 29 Dobřichovice, Ĉeĥa Respubliko.*

SKRIBAS LEGANTOJ . . .

RESPONDOJ

de Michel DUC GONINAZ,

Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko

. . . al s-ro D. C. (Ecquevilly, Francio)
pri la formoj "devintus", "povintus" . . .

Vortoj, kiaj *devintus* aŭ *povintus* estas gramatike ĝustaj. Zamenhof en la aludita Respondo juĝis, ke ili "per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo".

Vi prave rimarkigis, ke *beli* signifas *i bel(e)*, do ne nepre "esti bela", sed "aspekti, montriĝi bela". Tiu fenomeno ekzistas en aliaj lingvoj (ekz-e, por la koloroj). En la normalaj esperantlingvaj esprimoj "li diktatoras, ŝi ĵaluzas, varmas en Romo, ruĝas la horizonto", ĉiuj komprenas, kial oni ne uzas *est/*. Kompreneble, iuj el tiuj formoj estas laŭsence tre proksimaj al *esti -a (-e)*: *mi pretas, mi certas* k.s. praktike egalas kun *mi estas preta, certa* . . . Sed tio estas nur unu el la ebloj. "Kiu kolbasas?" – frazo eldirita dum junulara kunveno – signifis en la koncerna situacio: "Kiu deziras manĝi kolbason?"

Zamenhof ne rekomendis la uzon de verbaj finaĵoj post "participaj" sufiksoj, ĉar *i* ne egalas kun *esti*. Sed en la koncernaj sintagmoj *est/* estas plej ofte simpla kopulo, kies "propra signifo ne estas grava" (laŭ difino de PIV). Ekzistas neniuj lingvosciencaj argumentoj (krom la tradicia kaj falsa antaŭjuĝo, laŭ kiu la "participoj" estas "verbaj formoj") por permesi la uzon de *legeblas* aŭ *pagendas*, kaj malpermesi la uzon de *legatas* aŭ *pagotas*.

Zamenhof atendis sankcion de la Lingva Komitato por tiuj formoj. Ĉar tiu sankcio ankoraŭ atendatas, la lingvouzantoj ("la privataj aŭtoroj", laŭ la esprimo de Zamenhof) jam ekuzis ilin. Prave.

Ndir: laŭ sia statuto la AdE ne povis doni tian permeson! Ĝi nur povas akcepti aŭ rifuzi ion en uzado. Verŝajne hodiaŭ (1994) ĝi povus akcepti!

*

. . . al I. Sandner (Vieno, Aŭstrio)
pri la prononco de *Eŭropo* . . .

La lernolibroj (inkluzive de PIV) kaj instruistoj, kiuj parolas pri "diftongoj" malpravas kaj komplikas la problemon. Estas vere, ke *J* kaj *Ŭ* estas el fonetika vidpunkto, duonvokaloj (do duonkonsonantoj, kiel la duone malplena glasol!), kiujn ni povus pli neŭtrale nomi *glidoj* (aŭ *glajdoj*, aŭ senneologisme *glisantoj*). Tamen por funkciigi ĝuste la sonsistemon ni devas okupiĝi unuavice ne pri fonetiko, sed pri fonologio. Fonologie *J* kaj *Ŭ* estas konsonantoj (same kiel

en iuj lingvoj *R* estas vokalo). Do ili ne povas prononciĝi sen ĉeesto de vokalo, ili ne naskas silabon. En *Ĝiropo* estas nur tri silaboj, ĉar estas nur tri vokaloj. En *ankaŭ* estas du silaboj kaj la akcento estas sur la unua *a* pro tiu kaŭzo. Kaj oni ne bezonas fari buŝajn akrobataĵojn por elparoli normale : *ho-di-a-ŭa* (ne *ho-di-aŭ-a*) same kiel oni elparolas *ki-o-ma*, ne *ki-om-a!*) Tiu ekzemplo montras, kiel danĝera povas esti fonetika prezento de la fonologia sistemo de Esperanto. Zamenhof, kvankam ne-lingvisto, tute trafe pritraktis tiun problemon en la "Respondoj 69 kaj 70", kie ni povas legi : . . . *ili (Ŭ kaj J) ĉiam estas konsonantoj, tute egale, ĉu ili staras antaŭ vokalo aŭ post vokalo*", kio interalie devus silentigi tiujn, kiuj proklamas, ke Ŭ rajtas troviĝi nur post vokalo (kio estus stranga escepto en nia konsonanta sistemo).

NdIR : nova teorio, kiu volas silentigi la Fundamenton. Nek fakta, nek pria : la demando restas ne klarigita. — Ni almenaŭ meditu la fakton, ke Zamenhof skribis en la Fundamento Vaŝington, sed neniel Ŭaŝington! — Verŝajne oni devus agnoski, ke ŭ konsistigas du kompleksajn sonojn (aŭ, eŭ), kiuj funkcias kiel pliaj vokaloj : hiato disigas ilin de eventuala posta vokalo. Cetere mi ĉiam aŭdis : an-taŭ-ŭa, same kiel ofte di-ja-lo-go (malstreĉa prononco). En la streĉa prononco oni aŭdus an-taŭ-a kaj aŭdas di-a-lo-go. Sed, ŝajne, maloftega estas la prononco : an-ta-ŭa, sed erara estas : dja-lo-go.

*

DEMANDO

de Ionel Oneț (Berkeley, Usono)

Sur p. 7 de la n-ro 27 de *La Letero* leganto el Francio demandas : "ĉu formoj estas gramatike korektaj". Ĉu ne temas pri "gramatike ĝustaj"? Se ne, kion tiuj formoj korektas?

NdIR — Vi pravas . . . Tio estis agnoskita de la AdE (Aktoj, II, p. 54). Ni bonigu pedagogion!

*

KOMENTO

de Ionel Oneț (Berkeley, Usono)

La letero de Emilija Lapenna (p. 8) alportas nenion novan, krom — eble — la fakton, ke ĉiuj esperantistoj devus ŝafe obei la proponojn (do, ne decidojn) de la Akademio. Ĉu?

NdIR — Verdire temas pri rekomendoj, kies respekto estas necesa por eviti disdialektiĝon.

oOo

En tiu kazo, kiel klarigi la asertojn de la Prezidanto de la Akademio (p. 7) : "Transnomi rajtas nur la popoloj kaj iliaj reprezentantoj". Nu, kiuj estas la reprezentantoj de la Korea popolo en Esperantio, se ne la Koreaj esperantistoj mem?

NdIR — Jam tre diskutinda aserto! Fakte la reprezentantoj de kiu ain popolo estas ties registaro kaj asembleoj : ekzemple, kiam Persujo oficiale fariĝis Irano, kaj sekve ĉiuj lingvoj adoptis Iran, tiam Esperanto enkondukis la vorto-

jn Irano kaj Iranan(in)oj surbaze de tiu nova internacia nomo kaj de la respekto al la 15-a Regulo de la Fundamento.

oOo

Kaj kiom longe okcidentanoj ankoraŭ arogos al si la rajton fari decidojn pri orientaj (Aziaj) aferoj?

Ndir - Ankaŭ tre diskutinda aserto? La "okcidentanoj" neniel agas tiel! Ankoraŭfoje temas pri rekomendo de l' Akademio; due la rekomendo estas farita post ĝenerala voĉdono de la geakademianoj, inter kiuj estas Aziaj membroj; trie ĝi estas antaŭe studita kaj argumentita surbaze de etimologiaj kaj internaciaj konsideroj : se la Koreaj geesperantistoj nepre preferas la gentan tradicion al la internacia, ili nomu sin "Han(in)oj" kaj la landon "Hanlandon"!

oOo

La aserto de Emilija Lapenna : "se la Akademio aprobis liston de landonomoj, la movado tion devas respekti" sonas kiel postulo el la iama Orienta Eŭropo : "se la ĉiopova komunisma partio faris decidon, la popolo devas obei" (negrave ĉu la decido estas malĝusta).

Ndir - Jen ankoraŭ pli ol diskutinda aserto. Tio neniel koncernas politikan sintenon! La ekzistopravo de la Akademio laŭ la Fundamenta propono de D-ro L. L. Zamenhof estas fari arbitraciajn rekomendojn pri lingvaj konfliktoj, ĉar "kiom da kapoj, tiom da opinioj"! Kaj memkompreneble respekti tiajn rekomendojn restas la sola ebleco konservi la unuecon de la lingvo kaj eviti novan "Babel-turon".

oOo

Se Koreoj (= Koreanoj) estas obstinaj, netoleremaj kaj senrespektaj rilate la Akademion de Esperanto, eble tiu ĉi devas esti pli tolerema en siaj decidoj, ĉar kiam temas pri AdE "temas nur pri lingvaj aferoj" - kiel la prezidanto de la Akademio insistas sur p. 6-7.

Ndir - Ĝuste ĉar "temas nur pri lingvaj aferoj", ĉiuj kaj la Koreanoj mem memoru, ke ne temas pri apartaj plaĉoj.

*

KOMUNIKO

de Georgo Kamaĉo (Madrido, Hispanio)

- Pri PO kaj JE.

En privata letero Kolego Daŝgupto demandas, ĉu ne eblus rekomendi la prepozicion JE por la frakci-streka funkcio, donante iom da stabilo al la rutinaj kursestraj ĝustigoj de la klara misuzado de PO. Ekz-e : 60 km je horo - 60 km jehore - la jehora pago - ili pagas jehore.

Kiel verkiston min ĉiam tre ĝenis, ke apenaŭ eblas redoni en Esperanto la lernejan kantilenon pri multiplikado aŭ la mensajn paŝojn en divida operacio, kiel : 28 je 9 faras 3 kaj restas 1. La uzon de JE mi trovas oportuna kaj tre rekomendinda.

Ndir - Pri la prepozicio por la frakci-streko ni daŭre atendas la opinion de matematikistoj : kiun prepozicion ili uzas? Pri la aparta demando ĉu do ne taŭgus la esprimo : 28 one de 9 estas 3 kaj restas 1?

Jam de kelka tempo . . . blovadas kontraŭaj ventoj . . . super la Esperanta . . . alfabeto!

Unu propono de H. Lamily (Southall, Britio) levas la demandon, ĉu pli taŭgus la Araba alfabeto por Esperanto? Ĉefa argumento estas estetika kaj spacoŝpara . . . Sed kie restas la simpleco, kiam oni konstatas, ke ekzistas signoj izolaj, komencaj, mezaj kaj finaj? . . .

Alia sugesto de Bujdosó Iván celas transformi tekston ortografian al teksto fonetika sed surbaze de la Hebrea skribsistemo. – Nu, kiam oni konas la Hebrean senvokalan skribsistemon, ĉu ne iom ŝerca propono por lingvo tiel vokala kiel Esperanto? . . .

Sed Ĉino, Shi Yongning (Shijiazhuang), deziras precipe "mallongigi la vortojn, ekzemple : esperanto = espo – universala = usala – propagando = pagano – sociologo = sociogo – karakterizi = kartezi – prokrasto = pokasto – matematiko = matiko – " ktp. Ĉio ĉi celus tempoŝparon! Sed kiu rekonus Esperanton? . . .

Alia celo, tiu de Yannic Gicquel (post fondo de asocio AEIOU en Tuluzo, Francio) dissendas ian "deklaracion de la 3-a yarmilo" kiel "suplementon al la Deklaracio de Bulonjo (1905)". Apogante sian argumenton sur frazo de Prof. H. Tonkin pri "la nepra postulo de la elektronikaj rimedoj", li prezentas ian "universalan alfabeton" sen supersignoj de Jon Walter Yung . . . Li eĉ invokas konsilon de la tre konata Prof. André Martinet! . . .

Pri la sama temo ankaŭ René de Clerck (el Belgio) skribas : "Jen mia propono, se necesas forigi la literojn kun supersigno en la presita lingvo. Oni simple forgesas la supersignon kaj uzas la jam ekzistantajn literojn. Se la komputoroj nun povas legi Esperanton, ili havos nenian malfacilaĵon, kaj ni ne devas ŝanĝi la alfabeton. Do :

ĉ iĝas cj → cju, cjevalo

ŝ iĝas sj → sjipo

ĵ iĝas zj → zjurnalo

ĝ iĝas dzj → dzjardeno"

Ja oni povas demandi, kial ne uzi la Fundamentan literon H!

Sed multe pli trompa estas la petskribo dissendata de William Verch-w el Pittsburgh (PA, Usono) : ĝi venas efektive sub la ŝildo :

AKADEMIO DE ESPERANTO
ĉe UEA
Nieuwe Binnenweg 176,
NL 3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

Kio estas ja trompo, ĉar la sola tradicia AKADEMIO DE ESPERANTO de la 1-a Universala Kongreso en 1905 tute ne sidejas en Rotterdam ĉe UEA . . .

*

Kaj post tiu bilanco de disdialektiĝaj formoj oni povas miri pro la diroj de kelkaj, kiuj aŭdace demandas sin, ĉu la AKADEMIO estas ankoraŭ nun uti-la!!!

J. T.

PS. : La Akademio, sub prezidanteco de William Auld, verdiktis pri tiu demando (Aktoj, III, p. 72).

Informoj de la Akademio :

La jaro 1995 estos elekto-jaro. Ĉar la Akademianoj estas elektitaj por periodo de 9 jaroj, okazos balotado por renovigi la elirantan Trionon. Ĉiu eliranta Akademiano estas re-elektebla. Ĉiu nova kandidato devas sin konigi ĉe la Sekretario (S-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F 75017 Paris, Francio), li ricevos demandaron resendotan

plej malfrue la 31-an de Decembro 1994.

Post la renovigo de la Triono, la Akademio balotos por nova Estraro (Prezidanto kaj du Vic-Prezidantoj, Sekretario). Ankoraŭ poste venos la vico de la Direktoroj de la Sekcioj kaj Komisionoj.

Tiele proksimume ĉe la "kongresa" tempo la Akademio povos entrepreni novajn laborojn sub la direkto de nova Estraro kaj de nova Direktoraro.

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — Redaktoro : Jean THIERRY. — Direktoro de la publikaĵo : André BOURDEAUX. — Presejo : COCONNIER, 72300 SABLÉ. — C.E.P. : n-ro 6971. — Prezo : 1 n-ro : 40 FRE — Jara abono : 120 FRE — Pagebla : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. — UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRIVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, LEO.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso : Eldonejo kaj Librejo SONOPRILO. Doornstraat 22,

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : SeS Ed Jockey Club — Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Killianstr. 18, D 33098 PADERBORN, Germanio. — Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DE Meksiko.

Rusio : D-ro Sergey N. KUZNETSOV, Semashko 1/12 RUS 103009 MOSKVO.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono (23 \$).